

Geografia nomenklatur
Diverĝo, UEA-SAT, 4 tendencoj
Claude Gacond, 282-a radioprelego, 1969.03.05 & 08

Parolas Claude Gacond.

Ne ĉiam estas la plej dikaj kaj monumentaj verkoj, kiuj markis etapon en la antaŭena marŝado de nia lingvo. Ni ne forgesu, ke nia lingvo naskiĝis el kelkpaĝa broŝuro. Ni ne forgesu, ke la lingvaj klarigoj de René de Saussure, kiuj klarigas la vortfaradon de esperanto, nombras nur kelkajn paĝojn.

La *Mondmapo* redaktita de Tibor Sekelj kaj eldonita de Internacia Instituto por Oficialigo de Esperanto (IIOE), kvankam ĝi estas nura paperfolio, tute estas unu el la plej gravaj dokumentoj publikigitaj pasintjare en esperanto.

Tiu dokumento havas la avantaĝon aperi en taŭga historia momento. La debato pri la ekzakta rolo de la pasivaj participoj malakriĝis pro la deklaroj de la Akademio. La esperantistaro, kiu bezonas nutron por siaj prilingvaj debatoj, trovas dank'al la apero de tiu *Mondmapo* novan objekton de diskutado. Tiu nova debato, kiel la debato pri la pasivaj participoj, permesos fari paŝon antaŭen al la lingva unueco.

Se esperanto estas mirinde unueca malgraŭ sia neoficiala disvastiĝo ekster la lernejaj medioj, en la geografia nomenklatur ĝi havas tute alian vizaĝon. Kolizias en sama gazeto la etimologia nomenklatur kun esperantigoj, kiuj profunde diverĝas.

Trafoliante la jar-libron de UEA kaj SAT ni rimarkas preferojn. Ĉe SAT la sufikso **io** sisteme anstataŭas la sufiksojn **ujo** kaj **lando** uzataj de UEA.

Aŭstrujo – Aŭstrio ; Belgujo – Belgio ; Britujo – Britio.

Danlando – Danio ; Pollando – Polio ; Svislando – Svisio.

Sed se temus nur pri prefero de unu sufikso al la alia en paralela uzo, oni ne rajtus paroli pri kolizio. Pli atenta ekzameno de la jarlibroj de la du ĉefaj esperantistaj organizaĵoj pravas, ke la sufikso **io** uzata de SAT ne paralelas kun la uzo de la sufiksoj **ujo** kaj **lando**.

Finnlando kun du literoj **n** de UEA fariĝas ĉe SAT **Finio** kun unu sola **n**.

Landnomoj, kiuj ĉe UEA finiĝas nek per **ujo** nek per **lando** finiĝas ĉe SAT per **io** :

Brazilo, Kanado, Israelo de UEA iĝas ĉe SAT Brazilio, Kanadio kaj Izraelio.

Jen profundaj diverĝoj, kiuj pravas, ke la sufikso **io** tute ne estas anstataŭanto de la sufiksoj **ujo** kaj **lando**.

Sed la landnomoj estas parteto de la geografia nomenklatur. Apud la landnomoj ekzistas la nomoj de la maroj, de la montoj, de la riveroj, kaj ceteraj.

Por reveni al la jar-libroj de UEA kaj SAT ni ree rimarkas kontraŭajn preferojn.

Ĉe UEA eĉ en la listigo de la Universalaj Kongresoj oni rezignis pri la esperantigitaj formoj. Oni legas **Boulogne-sur-Mer**, **Genève**, **Cambridge**, **Dresden**, **Barcelona**, **Washington**, **Antwerpen**, **Kraków**, **Bern**, **Paris**, **San Francisco**, **Den Haag**, **Praha**, **Helsinki**, **Nürnberg**, **Wien**, kaj ceteraj.

Ĉe SAT en la listigo de la propraj kongresoj oni legas la esperantigitajn formojn : **Prago**, **Frankfurto**, **Kaselo**, **Bruselo**, **Vieno**, **Leningrado**, **Liono**, **Gotenburgo**, **Lejpcigo**, **Londono**, **Amsterdamo**, **Ŝtutgarto**, **Stokholmo**, **Valencio**, **Parizo**, **Manĉestro**, kaj ceteraj.

Tiuj du jarlibroj respegulas du tendencojn pri la geografia nomenklatur. Pli atenta ekzameno montros, ke fakte ekzistas kvar tendencoj en la esperantistaro rilate al la geografia nomenklatur. UEA nun sufiĉe bone bildigas la tendencon al minimuma esperantigo de tiuj nomoj. En la praktika uzo de la lingvo oni renkontas multajn mezulojn, kiuj elektas de UEA la **uj**-sistemon por la landnomoj, kvankam ili ofte anstataŭas la sufiksojn **ujo** kaj **lando** per la

Geografia nomenklatur
Diverĝo, UEA-SAT, 4 tendencoj
Claude Gacond, 282-a radioprelego, 1969.03.05 & 08

sufikso **io** kaj kiuj esperantigas la ĉefajn geografiajn nomojn. La nomenklatur de la *Mondmapo* de Tibor Sekelj respegulas tiun tendencon.

La kvara tendenco sin ĝis nun ne esprimis tre klare. Tamen ĝi ŝajnas al ni sufiĉe forta. Ĝi vidas en la tri menciitaj tendencoj kripligon de propraj nomoj kaj emas uzi la geografiajn nomojn, kiel oni uzas la nomojn de personoj. Tiuj esperantistoj bedaŭras la monotonecon de la esperantigita geografia nomenklatur kaj pensas, ke kio valoras por la esperanta radikaro ne necese valoras por la geografia. Ili konstatas, ke la propono de Kolomano Kalocsay farita en 1931 konsideri la literon **a** kiel finaĵon de la virinnoj renkontis ĝeneralan aprobon de la esperantistaro.

Hodiaŭ la ĝenerala uzo preferas **Eva** al **Evo** por la edzino de **Adam**, **Andrea** al **Andreino**, **Paŭla** al **Paŭlino**, **Roza** al **Rozo**. Tiuj esperantistoj ankaŭ konstatas interesan evoluon ĉe la virinnoj. **Adamo**, **Paŭlo**, **Omero** tendencas perdi la finan **o** kaj iĝas **Adam**, **Paŭl**, **Omer**.

Tiuj esperantistoj pensas, ke same estos por la geografiaj nomoj. Kial la internacia nomo **Canada** devas iĝi en esperanto **Kanado** ? Kial **Alaska** devas iĝi **Alasko** ? Kial **Dakota** devas iĝi **Dakoto** ? Kial **Bern**, **London**, **Berlin**, **Jutland**, **Mali** devas ricevi finan **o** kaj iĝi **Berno**, **Londono**, **Berlino**, **Jutlando**, **Malio** ? Tiu kvara tendenco ne donas la rajton al esperanto kripligi la geografiajn nomojn. Ĝi nur donas al ĝi la rajton elekti la formon plej taŭgan al internacia uzo.

Dum la tri aliaj tendencoj pli malpli provas submeti la geografian nomenklaturon al la esperantaj fonetiko kaj alfabeto, la kvara tendenco pensas, ke kiel por la propraj nomoj esperanto devas agnoski la ekziston de la ekster-esperantaj kutimoj, ĉu fonetikaj, ĉu alfabetaj.

Neniu kripligis la nomon **Baghy** transformante ĝin al **Bago** aŭ al **Baghi** ku litero **i** anstataŭ la litero **ipsilono**. Neniu gazeto skribas la nomon **Waringhien** per simpla **vo** anstataŭ **duobla vo** pravigante, ke la esperanta alfabeto ne posedas tiun literon. Kial kutimo, kiu kontentige funkcias kun la homaj nomoj ne konvenas al la geografiaj nomoj ? Jen la konkludo de la kvara tendenco.

En ĉio mezvojo estas elektebla. Estas bone provi solvi la debaton por la landnomoj, oficialigi fundamentan geografian nomenklaturon. Sed tiu oficialigo devas respekti la propran karakteron de la geografiaj nomoj. Ĝi nepre devas eviti trudi al la geografiaj nomoj tro rigidajn regulojn kaj tiel konduki al malagrablaj kripligoj. Ĝi nepre devas eviti la monotonecon de la **o**-finantaj substantivoj.

Esperantistoj povas por tempo decidi, ke **Korfu** iĝas **Korfo**, **Kjuŝu** iĝas **Kjuŝuo** kaj **Java** **Javo**. Tamen la vivo estas pli forta ol la decidoj de la esperantistoj. **Korfu**, **Kjuŝu** kaj **Java** ne iĝos fantomoj, sed restos vivantaj nomoj, kiuj fine mortigos la fantomojn de la artefariteco.

La *Mondmapo* malfermis diskuton. Dum la venontaj elsendoj ni provos diskonigi la kvar vidpunktojn, kiuj interbatalas. Ni malferme donos niajn proprajn vidpunktojn kaj volonte legos viajn personajn reagojn.

Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-